Conrad Ferdinand Meyer,

Paco sur tero

tradukita de Willy Nüesch

La paŝtistoj en libero
Lasis gregon, l' anĝelvorton
Portis tra la basan pordon
Al patrino kaj infan'.
Plu kantadis en lontan'
Ĉielgent' en spaco stela,
Plu sonoris la ĉiela
"Paco, paco sur la tero!"

Ekde tiu vort' anĝela
Ho ve, kiom da kruela
Faris la militkolero
En kiras', sur rajdobest'!
Ofte dum kristnaska fest'
Ĥor' spirita kantis time,
Insistpete, plendesprime:
"Paco, paco ... sur la tero!"

Sed eternas kredregulo,
Ke ne ĉiam la feblulo
Iĝos pred' kaj rabkonkero
De aroga murdogest':
Iaspeca justo-est'
En horor' kaj murdo rolas,
Regno sin konstrui volas,
Serĉas pacon sur la tero.

Iom post iom ĝi formos
Sin, oficos sankte, forĝos
Batalilojn sen danĝero,
Flamoglavojn por la rajt'.
Filoj kun forteco-trajt',
Reĝa gento ekburĝonos,
Kies helaj tubjoj sonos:
Paco, paco sur la tero.

. . .

Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de Conrad Ferdinand Meyer *(Konrado Ferdinando Majero, ∗1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

Arg-101-274 (2013-08-28 18:38:58)

La tradukinto, s-ro Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tel. 0041-31-302 66 56), donis al mi, Manfred Retzlaff, en 2005-07-11 la skriban permeson pri la publikigo de tiu ĉi poemo en mia retejo "www.poezio.net". La poemo enestas ankaŭ en la libro "Elektitaj poemoj de Conrad Ferdinand Meyer", kiun eldonis s-ro Willy Nüesch. Ĝi estas aĉetebla ĉe li aŭ ĉe la libro-servo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).